

14, Japanujo 22, Jugoslavio 36, Meksikio 8, Nederlando 47, Norvegujo 14, Novzelando 4, Svedujo 10, Urugvajo 6, Usono 21, rekte ĉe la eldonisto kaj pere de UEA (el diversaj landoj) 15. La malkresko per nur 6 membroj, malgraŭ la tre plialtigita kotizo, estas grava sukceso de niaj delegitoj kaj de ISAE entute. La kontakto inter la delegitoj kaj la sekretario pliboniĝis kaj oni povas prave esperi ke dum la jaro 1959 preskaŭ ĉio ordiĝos.

La sekretario (prof. B. Popoviĉ, Sarajevo) ricevis 106 korespondaĵojn kaj forsendis 122 leterojn kaj 5 cirkulerojn. Krome la sekretario aperigis kaj dissendis apartan Bultenon por ĉiuj membroj, kun la propono de la Statuto kaj alvoko al la referendumo pri ĝi. Pri la alvenintaj 62 respondoj aperis mallonga analizo en SR 10 128. Pro tiel granda laboro la ĝenerala sekretario ne povis (aŭ iam povis tre malfrue) respondi al ĉiuj leteroj.

La Terminologia Centro (R. Haferkorn, Berchtesgaden) funkcias regule, en kunlaboro kun la Akademio de Esperanto.

Eldona aktiveco. Scienca Revuo aperis kun 3 numeroj el la pasinta jaro kaj 3 numeroj el la jaro 1958, tiel ke ĝi nun malfruas per nur 1 numero. Ni esperu ke la decido de la jarkunveno pri la reguligo de la revuo efektiviĝos plene kaj ke la revuo fariĝos vere la kontaktilo inter la membroj kaj la Estraro. Tiurilate ni povas nur bedaŭri ke la eldonisto ne plenumis la antaŭan interkonsenton pri sendado de la revuo al ĉiuj landoj, kio alkondukus pli ol 100 novajn membrojn al ISAE. *Sciencaj Studoj* aperis kaj estis dissenditaj al la antaŭmendintoj, flanke de la danlanda delegito. La distribuon de la resto transprenis la eldonejo KOKO en Kopenhago. Pri la disvendado kaj pri la financa stato de *Sciencaj Studoj* la ĝenerala sekretario poste faros apartan raporton.

La jarkunveno okazis en Mainz (Okc. Germanujo). Ĝia ĉefa decido estis la postulo (kun konsento de la redaktoro kaj de la reprezentanto de la eldonisto) pri reguligo de la revuo. La dua kongresa kunsido de ISAE pritraktis la problemon de popularsciencaj eldonaĵoj. La membroj konkludis ke ili estas nepre bezonaj pli multaj, sed ke ni kunlaboru kun popularscienca serio de STAFETO. Post tio la ĝenerala sekretario korespondis kun la eldonisto de STAFETO kaj la Estraro decidis ne aperigi propran bibliotekon, sed kunlabori kun STAFETO.

CIKI (Centro por internaciaj kulturaj interŝanĝoj) ne povis ekfunkcii pro manko de aktivulo kiu transprenus ĝian gvidadon. Eĉ la Traduka Servo ne povis, pro la sama kaŭzo, funkcii regule, kvankam la redaktoro de S.R. organizis kelkajn tiajn servojn. (Li ankaŭ proponis al UEA organizi la servon de CIKI, sed la Estraro de UEA ne akceptis la proponon). La interesiĝo por CIKI ĝenerale, kaj por la Traduka Servo speciale, ekzistas kaj ni devas klopodi trovi konvena(j)n homo(j)n por ilia gvidado.

La Estraro de ISAE.

PROTOKOLO

pri la jarkunveno de ISAE dum la 44-a Univ. kongreso en Varsovio, okazinta la 2-an de aŭgusto 1959

La jarkunvenon partoprenis 46 personoj el 18 landoj; ĝi komenciĝis je 16h 10m. Prezidis la vicprezidanto d-ro P. Neergaard, protokolisto la ĝenerala sekretario prof. B. Popoviĉ. Proponita kaj akceptita la

Tagordo:

1. Malfermo
2. Raporto pri la agado de ISAE dum la jaro 1958
3. Ekonomia raporto por 1958
4. Diskuto pri la raportoj
5. Absolvo de la Estraro por 1958
6. La laboro de la centroj de ISAE
7. Kontakto kun la sekcioj
8. Diversaĵoj
9. Fermo

I

D-ro Neergaard bonvenigis la ĉeestantaron kaj transdonis la mesaĝon de la forestanta prezidanto de ISAE, prof. Collinson, kiu ankaŭ publike dankas pro sia elekto kiel prezidanto.

II-V

La ĝenerala sekretario tralegis la raporton pri la agado en la pasinta jaro kaj el la ekonomia raporto li donis nur kelkajn detalojn (post konsento de la ĉeestantoj). La raportoj estas aldonitaj al la protokolo. La jarkunveno akceptis la raportojn kaj absolvis la Estraron sen diskuto.

VI

La ĝen. sekretario tralegis mallongan raporton de inĝ. Haferkorn pri laboro de la Terminologia Centro, precipe pri ordigo de la Centra Sliparo, al kiu konstante kontribuas pluraj fakaj kompetentuloj. Mankas fakestroj por kelkaj fakoj, precipe por *ŝipotekniko kaj militista tekniko*. S-ino Marie Bartovska preparas *Lernolibron por Teksindustrio* kaj la gvidanto de la Centro rekomendas tian praktikan uzon de esperanto ankaŭ en aliaj fakoj.

Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj (CIKI) ne povis regule ekfunkcii pro manko de konvena gvidanto (Post korespondado pri la afero mag. Hanuŝ fine malakceptis la taskon pro timo ke li eble farus dum la laboro ion kontraŭ sialandaj preskriboj). Prof. Popoviĉ kaj d-ro Roelofs (kiuj ankaŭ jam faris servojn por CIKI) klopodas trovi la gvidanton de CIKI. D-ro Roelofs ankaŭ faris skriban proponon al UEA ke CIKI estu organizata sub ĝiaj aŭspicioj,

sed la Estraro de UEA ne akceptis la proponon, kvankam ekzistas granda interesiĝo por servoj de la centro en la landoj sen libera monŝanĝo (ankaŭ de unu granda entrepreno en Ĉeĥoslovakio).

La Traduka Servo, kiel parto de CIKI, pro sama kaŭzo ne ekfunkciis, kvankam estas faritaj kelkaj tradukoj el japana lingvo kaj ankaŭ patentita institucio el Novzelando interesiĝas pri la tradukoj.

En la diskuto d-ro Barasi (Anglujo) interesiĝis ĉu la Traduka Servo povas servi nur al unuopuloj aŭ ankaŭ al organizaĵoj, kaj ricevis la respondon ke ĉiu povas utiligi ĝiajn servojn. D-ro M. B. Kostić (Jugoslavio) subtrekis gravecon de originala verkado en esperanto kaj montris la ekzemplon de prof. Popoviĉ, kiu en la lastaj jaroj publikigis pli ol 10 artikolojn kaj kelkajn resumojn pri astronomio en diversaj neesperantistaj sciencaj periodaĵoj.

P. Zlatnar (Jugoslavio) subtenas iniciaton de Bartovska pri lernolibro kaj opinias ke oni devas precipe fari lernolibrojn por studentoj. La fakvortaroj devas veni el la faka literaturo (kaj nun ŝajnas kontraŭe). Pro tio nia agado inter studentoj estas tre malforta. D-ro Neergaard (Danlando) konsentas ke la terminaroj estas pli-malpli morta literaturo, sed la ĝeneralaj libroj devas esti sufiĉe popularaj por pli larĝa publiko. B. Sadovski (Pollando) emfazas disproporcion inter la beletra kaj scienca literaturo en esperanto. Oni devas pli multe skribi almenaŭ la resumojn en esperanto. Nun ne utilas ĝeneralaj teknikaj vortaroj, sed ni bezonas la terminarojn por apartaj fakoj. B. Popoviĉ (Jugoslavio) nur parte konsentis kun la eldiritaj opinioj kaj opinias ke la sukceso estos plej rapida se oni aktivigas samtempe kaj popaŝe en ĉiuj direktoj. Por altnivelaj sciencaĵoj (tutaj artikoloj aŭ resumoj) ni ne bezonas financajn rimedojn, ĉar ilin aperigas aliaj organizaĵoj, krome ni penetras neesperantistan sciencan publikon. Lernolibroj estus tre utilaj kaj ni devas ekaperigi ilin, kvankam tio postulas financajn rimedojn. Por popularsciencaj libroj ekzistas jam granda interesiĝo kaj la Estraro interkonsentis kun Régulo Pérez subteni la popularscienca serion de STAFETO anstataŭ aperigi propran bibliotekon. La agado en ĉiuj tiuj direktoj pliriĉigos la terminarojn, sed aliflanke la verkistoj bezonas kolektojn de la jam ekzistantaj terminoj kaj ISAE devas nepre almenaŭ multobligi fakajn terminarojn kaj tiel helpi la verkadon en esperanto.

La jarkunveno komisiis la Estraron daŭrigi la klopodojn, ankaŭ kun UEA, ke Traduka Servo ekfunkciu kaj ke oni organize solvadu la problemon de interŝanĝo de nia literaturo inter ĉiuj landoj.

VII-IX

La ĝenerala sekretario informis ke ĝis nun ekzistas jure neniuj sekcio de ISAE. La juristoj decidis aliĝi al ISAE, sed ili ankoraŭ ne faris tion.

Eĉ STELO, kiu ja estas fondita kiel la studenta sekcio kaj kiu kunlaboras kun ISAE, formale ankoraŭ ne aliĝis. Ni devas klopodi ke ankaŭ aliaj, nun fondiĝantaj aŭ reaktiviĝantaj organizaĵoj aliĝu al ISAE, tiel ke ĝi fakte fariĝu la tegmento por ĉiuj fakaj organizaĵoj. La jarkunveno konkludis ke la membroj klopodu realigi tion.

K. Ostrovski (Pollando) postulis ke oni ebligu ricevadon de almenaŭ unu ekzemplero de Scienca Revuo al pli grandaj grupoj de scienculoj, kiel ekz. en Krakovo. La ĝen. sekretario informis ke pri tio kulpas la eldonisto, ĉar li ne plenumis la interkonsenton sendi la revuon al ĉiu adreso por kiu ISAE garantias la pagon.

La jarkunveno kondamnis tian agon de la eldonisto kaj komisiis la Estraron insiste postuli la sendadon de la revuo al ĉiu membro.

Pro manko de tempo (eĉ la lastaj du punktoj estis diskutitaj la postmorgaŭan tagon, post finita diskuto pri *Sciencaj Studoj*) oni ne povis pridiskuti kelkajn aliajn proponojn, kaj la jarkunveno rajtigis la Estraron pridiskuti ilin kaj fari la decidojn.

La prezidanto fermis la kunvenon je 17h 50m.

B. Popoviĉ (p.m.)

061.22(ISAE).053.7.,1959.08.02"(438.11) : 061.22(ISAE).055.6 : 001(082)
=089.2

5(082)

KRITIKA PRIDISKUTO DE „SCIENCAJ STUDOJ”

en la larĝa kunveno de ISAE dum la 44-a Univ. kongreso en Varsovio okazinta la 4-an de aŭgusto 1959 de 14h 10m ĝis 15h 20m

Partoprenis ĉ. 60 personoj. Prezidis la vicprezidanto de ISAE d-ro Neergaard; protokolis la ĝenerala sekretario de ISAE prof. B. Popoviĉ.

Malfermante la kunvenon, d-ro Neergaard emfazis la gravecon de la verko kaj la jam pasintajn antaŭdubojn ke ni trovos nek la aŭtorojn nek la aĉetontojn.

M. Lewin (Britujo) demandis ĉu ne estis eble ke la aŭtoroj donus liston de neologismoj. Neergaard respondis ke oni devis fari tion kaj ke oni faros ĝin en *Scienca Revuo* aŭ en la dua volumo de *Sciencaj Studoj*.

K. Ostrovski (Pollando) deklaris ke oni tre deziras baldaŭan aperigon de la dua volumo.

K. Domslovski (Pollando) rimarkas ke mankas ekonomiaj sciencaĵoj (statistikaj kaj aliaj) kaj estonte oni devus kolekti ankaŭ homojn kiuj okupiĝas pri tiuj sciencoj. La enhavo estas tro diversflanka — estas pli bone aperigi kelkajn seriojn, sed tie kuŝas granda financa problemo. Li miras kiel oni finance sukcesis aperigi la libron.